

Novaĵoj Tamtamas

横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

Niaj Klasoj kaj Kursoj [★=novaĵoj]

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Meza klaso gvidata de Doi Ĉieko; de junio oni lernas per kroata rakonto "Mirindaj Aventuroj de Metilernanto Hlapiĉ". / (2) Klaso por legado de "Vivo de Lanti", baldaŭ finota, kaj ★ oni legos "Hispana, Kataluna, Mangada..." / (3) Jokohama Salono / (4) Daŭriga kurso, gvidata de Fuse Kentarou.

*Regulaj Klasoj en merkredo: (1) Oni finis la verkon de Edmond Privat, "Karlo" en aŭgusto, ★ kaj nun legas "Kie boacoj vagadas" de Eija Salovaara. / (2) Daŭriga kurso, per la posta parto de "Hanako lernas Esperanton".

TIEL OKAZIS

La 101a

Japania Esperanto-Kongreso

*de la 11a ĝis la 13a de oktobro, en Urbo Obama, 500km for de Jokohamo.

Pluraj rondanoj partoprenis ĝin, kaj ankaŭ nia rondo prezentis standon. S-ro Doi Hirokaz el nia rondo aktivis en la Loka Kongresa Komitato de antaŭ unu jaro.

Internacia Festo de Jokohamo

*la 18a kaj 19a de oktobro, en la Parko Zoo-no-hana.

En la serenaj tagoj, nia rondo ekspoziciis pri Esperanto en tendo, el inter multaj tendoj de la grupoj, koncernantaj kunlaboron/amikiĝon kun aliaj landoj. Ni disdonis flugfoliojn pri nia rondo, kaj prezentis pri Esperanto al la venintoj.

NIAJ PLANOJ

[jam informitaj]

Hama-Ronda Vespero pri Jui Ĉuunoŝin

*la 15a de novembro, 17h00-19h00, ĉambro 710 de la regula kunsido.

Vizito al la tombo de Jui

*la 23a de novembro posttagmeze, en la tombejo Kamakura-Reien.

Zamenhof-Festo en Kanagaŭa, 2014

*la 14a de decembro, 13h00-16h30, en la Tikyuu Simin Kanagawa Plaza (etaĝo 5)

*kotizo 800 enoj, (300 enoj por 30a jaraĝo aŭ pli junaj).

*karakteriza evento: prelego pri la vivo de Vasilij Eroŝenko kaj deklamado de liaj verkoj. (Pardonon, ke en la novembra n-ro, tiu ĉi festo estis priskribita kiel afero en 2013. Temas ja pri la venonta, 2014-a festo!)

[novaj informoj]

La 97-a Legokunsido

*la 13a de decembro, 13h00-15h00, ĉambro 603 de la regula kunsido

*la libro temata: "Pri homoj kaj verkoj" (eseoj pri la Esperanto-kulturo), eld. de UEA en 2012.

Ĝenerala jarkunveno de Jokohama Esperanto-Rondo

*la 25a de januaro 2015

*en la Tikyuu Simin Kanagawa Plaza

■ Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

ESEO

Ne forgesblaj korespondantoj germanaj

SIBAYAMA Noriko

Post unu aŭ du jaroj da korespondado kun Jana, mia unua korespondanto, mi trovis jenan anoncon en La Revuo Orienta: Germana knabo serĉas plenkreskulan korespondanton. Tiam mi havis iom da memfido por korespondado, kaj interesiĝis pri infana vivo en aliaj landoj, mi tuj reagis. Tiel mi amikiĝis kun Michael Hartmann, 11-jaraĝa ĉarma knabo en Okcidenta Germanio.

Kial li serĉis plenkreskulan korespondanton? Ĉar li celis pliprogresigi sian Esperantan kapablon, aŭ pli ekzakte dirite, lia gvidanto nomata Bruno Vogelmann deziris tion. Liajn leterojn ĉiam Bruno korektis, dirante, ke infanaj literoj estas malfacile legeblaj. Kaj ĉiam ankaŭ la letero de Bruno kune atingis min.

La knabo ĉiam subskribis sian leteron kiel "Mycy (majki aŭ majgi)", lia karesnomo. Mi mem ne havis karesnomon, tial mi demandis lin, kian karesnomon li proponas por mi. Li respondis, ke "Noki" aŭ "Riko" estas bona. Mi estis ĝoja nur pri tio, ke li cerbumis karesnomon por mi. Samtempe Bruno proponis "Merlo"n kiel mian karesnomon. Mi konsultis "merlo"n en vortaro, kaj trovis, ke ĝi estas birdo bele

pepanta. Mi estis des pli ĝoja.

Post kelkaj jaroj mi edziniĝis. Mi kaj mia edzo decidis partopreni en Silvestra Kunloĝado en Germanio dum miela vojaĝo. Kaj ni planis antaŭe renkonti Mycy kaj Bruno. Bruno volonte invitis nin en sian domon. Ĉe flughaveno de Frankfurto Bruno atendis nin kaj regalis per pomsuko. Li ridetante ŝerce diris, ke ĉar ni estas japanoj, kontrolistoj suspektis nin, ĉu membroj de radikala partio. Ĝuste tiam japana radikala partio bruigis la mondon.

En la domo de Bruno jam estis Mycy, svelta junulo, kaj ankaŭ lia patrino. En la ĝardeno de Bruno, tie kaj ĉi tie troviĝis pupaj hobitoj kiel kristonaska ornamo. Li ŝoforis nin en romantikan straton, helpis nin dum aĉetado. Li ŝajnis eminentulo de tiu loko, kaj en ĉiu vendejo oni salutis lin respektplene. Ni ĝuis komfortan kaj memorindan tempon en lia domo.

Post pluraj jaroj ni trovis nekrologon de Bruno Vogelmann en la revuo "esperanto". Ni ege bedaŭris kaj rememoris lian afablan vizaĝon.

BIOGRAFIO

VASILIJ EROŜENKO – JAPANA POETO (1)

Tatyana Auderskaya (Ukrainio), verkita en 2012

Ĉi-jare okazas kelkaj datrevenoj, ligitaj kun la fama E-verkisto Vasilij Eroŝenko:

- 100-jariĝo de lia unua eksterlanda vojaĝo,
 - 90-jariĝo de "Fabeloj de Eroŝenko", trad. Lu Sin,
 - 60-jariĝo de la morto de Eroŝenko,
 - 50-jariĝo de la unua libro de Eroŝenko en la rusa ("Koro de aglo"),
 - 10-jariĝo de sukcesa laboro de internacia esplora grupo pri vivo kaj verkado de Eroŝenko.
- vidu www.eroshenko-epoko.narod.ru
http://vk.com/im#/club_vasilij_eroshenko

Multaj miloj da kilometroj disigas Rusion kaj Japanion. Malsimilas iliaj kulturoj kaj naciaj tradicioj. Tamen, ekzistas unu eksterordinara kazo, kiam filo de nia lando iĝis japana verkisto, klasikulo de japana literaturo. Krom tio, dum la tuta vivo li estis fervora esperantisto. La nomo

de tiu homo estas Vasilij Eroŝenko.

Lia sorto estas unika. Li naskiĝis en 1891 en vilaĝa familio en ukraina vilaĝo Obuhovka(*1) de Kurska gubernio, sur la limo de Ukrainio kaj Rusio. En la aĝo de 4 jaroj li blindiĝis, kaj estante blinda, li traveturis la tutan mondon.

Li fondis lernejojn por blinduloj en Hindio, Tajlando, Birmo; lernis en Londono, laboris en Ĉinio, sur la Ekstrema Nordo kaj la Ekstrema Sudo de Sovetunio.

- Ĉu tio eblas? - vi demandos. - Ĉu blinda homo ne estas destinita al eterna tenebro kaj senespero? Ĉu eblas aktiva krea vivo por la homo, kiu estas senigita de la plej grava sia sensororgano, donanta ĉ. 80% de la tuta informo pri la ĉirkaŭa mondo?

Sed jen kion diras mem Vasilij Eroŝenko en sia aŭtobiografio: "Mi estas blindulo. Mi blindiĝis je kvar-jara aĝo. Kun petegoj, en larmoj forlasis mi kolorriĉan mondon. La nokto por mi ĉiam daŭros, kaj ne finiĝos ĝis mia lasta spiro. Sed ĉu mi malbenas ĝin? Ne, tute ne".

Tiu homo mem portis en si la lumon: la lumon de bonkoreco, homamo, humaneco. Tiu interna lumo helpis al li vidi en homoj ilian internan esencon, - kaj li estis amiko de multaj eminentaj homoj. Tiu lumo prilumigis ankaŭ la eksteran mondon - kaj Eroŝenko povis kaj rajtis diri: "Hieraŭ mi vidis Tokion", aŭ: "Kiel bela estas urbo Pekino", aŭ: "Mirinda vidaĵo malfermiĝas ekde la monto Fuĝijama". Li "vidis" pagodojn de Moulmejn(*2), neĝojn de Ĉukotka(*3) kaj sablojn de Karakumi(*4), hindiajn ĝangalojn kaj Westminster(*5) en Londono. Unu el la libroj, verkita pri li, nomiĝas ĝuste tiel: "La homo, kiu ekvidis la mondon".

(*1) Obuhovka (vilaĝo): オブホーフカは今のロシア共和国のウクライナに近いところにある村。

(*2) Moulmejn (urbo): モーラミヤインはミャンマー (エロシエンコ当時のビルマ) の南部の町

(*3) Ĉukotka (duoninsulo): チュクチ半島 (あるいはチュコト半島ともいう) はロシア最東端、ベーリング海に接する半島。チュクチ民族 (ĉukĉoj) が住む。


(*4) Karakumi (dezerto): カラクム砂漠は中

央アジアのトルクメニスタンにある砂漠。

(*5) Westminster (en Londono): ウェストミンスターは英国ロンドン内の地名であり、イギリス国教の寺院、カトリックの大聖堂が有名である。

Eroŝenko vidis la mondon per sia koro; kaj tiu grandega spirita forto helpis al vilaĝa knabeto saviĝi el la ĉirkaŭanta lin tenebro.

Je la aĝo de 9 jaroj li eklernis en la Moskva Lernejo por blinduloj. "Mi estas la plej feliĉa en la mondo: mi vidas sunon, mi vidas lumon!"



- tiel li skribis hejmen post konatiĝo kun Brajla(*6) skribsistemo. Li ankaŭ ellernis tie muzikon: li ludis pianon, violonon, gitaron. Ludis ne pro tio, ke oni speciale instruis lin - li arde lernis mem, ĉar la flamo de soifo scii, komperni, povi, krei flagris en lia animo.

En 1908 Vasilij Eroŝenko eklaboras en la Moskva Ĥoro kaj orkestro de blinduloj. Ankaŭ tiam okazis la evento, kiu definitive ŝanĝis lian tutan vivon: li konatiĝis kun esperantistoj (helpe de moskva esperantistino Anna Ŝarapova(*7)) kaj eklernis la lingvon Esperanto. "Verdire, mi povas aserti, ke la sorĉa lampo de Aladino ne

povus helpi al mi pli multe, ol faris la genio de reala vivo – Ludvig Zamenhof, kreinto de Esperanto”. Ĝuste Esperanto helpis al Eroŝenko vere EKVIDI la mondon, ĝi reale disigis antaŭ li ĉiujn ŝtatlimojn kaj malfermis al li korojn de homoj.

En 1912 Eroŝenko helpe de esperantistoj veturas al Anglio. Dum la vojo lin, ankoraŭ ne regantan fremdajn lingvojn, ĉiam renkontis esperantistoj, helpis pri loĝado, trajnŝanĝoj, vojbiletoj. Dank’ al Esperanto la blinda homo traveturis la tutan Eŭropon, kaj reale konvinkiĝis pri vera interkompreno kaj interhelpo de tiel diversaj homoj el diversaj landoj.

En Londono Eroŝenko studis en la Reĝa Porblindula Akademio(*8), vizitis la Britan Muzeon, ekinteresiĝis pri budhismo kaj do eklernis la lingvon *pali*(*9), kaj, certe, la anglan kaj la francan.

Sed la vivo en trolimigita, snoba kaj tiam sufiĉe rasista angla socio ne ekplaĉis al li, kaj post 8 monatoj Eroŝenko revenas al Rusio, por prepariĝi al vojaĝo al Japanio.

Oriento ĉiam estis proksima al rusa animo; Rusio estas firme kunligita, per ligoj de spirita kaj genetika parenceco, kun Oriento; kaj post sufokige racia Okcidento, kiel fabelo, kiel revo allogis lin la “promesita tero de l’ Animo” - la antikva Oriento.

Verdire, Eroŝenko ne estis sola en tia strebo. Rememoru almenaŭ H. Hesse(*10), kun lia dediĉo: “Al Pilgrimantoj al la lando de Oriento” de sia plej grava verko; aŭ “Okcident-Orienta divano” de Goete(*11). Oriento ĉiam estis “La promesita lando” de Spirito, de Animo – por tiuj, kiuj serĉas ĝin. Vasilij Eroŝenko vere serĉis.

(*6) Brajla (de Braille): ブライユ方式 (6点で文字をあらわす点字方式) の。

(*7) Anna Ŝarapova (rusa esperantistino): アンナ・シャラポヴァ、ロシアの女性エスペランチスト、(1863-1923)。

(*8) Reĝa Porblindula Akademio (en Britio): 英国王立盲人カレッジ。

(*9) *pali* (lingvo): パーリ語、仏典を記述する言語の一つ。

(*10) Hermann Hesse (germana literaturisto): ヘルマン・ヘッセ。

(*11) Goete (germana literaturisto): ゲーテ。

En Tokio li lernis psikologion, medicinon, muzikon, japanan lingvon kaj literaturon,

masaĝon, akupunkturon; ekmastris ankaŭ japanajn naciajn muzikilojn *koto*(*12) kaj *ŝjamisen*(*13). Tie li konatiĝis ankaŭ kun ideoj de bahaismo(*14), kiuj esence estis proksimaj al li. Li komencis verki fabelojn kaj teatraĵojn en la japana lingvo.

En la lastaj monatoj antaŭ la forveturo el Japanio, Eroŝenko okazigis religian disputon kun Rabindranat Tagor(*15), kiu tiam lekciis en Tokia Universitato(*16). Eroŝenko mem prelegis en Tokia Universitato: pri rusa literaturo kaj kulturo, kaj, kompreneble, pri Esperanto. Sed da ĉio tio estis tro malmulte por li.

Eroŝenko tiel diris pri Japanio: “Tro malmulte da tero kaj tro multe da feliĉo”. Ankaŭ mi estis en Japanio, kaj mi povas diri la samon. La animo ne povas enteni tiom da zorgemo kaj amo, kiom donas al vi japanoj. Oni ne povas percepti tiun amon kiel memkompreneblan aferon; oni nepre devas redoni ĝin...

Kaj Eroŝenko forveturas el Japanio. Li devas helpi al siaj nevidantaj gefratoj en subevoluintaj aziaj landoj, kie blindecon oni konsideras kiel ĉielan malbenon, kaj la blinduloj mem estas ĉiamaj parioj... “Se mi ne faros tion, - skribis poste Eroŝenko, - mi opinius mian vivon travivita vane”.

(*12) = *kotoo*, japana kordinstrumento surplanka: 琴。

(*13) = *ŝamiseno*, japana kordinstrumento brake portata: 三味線。

(*14) bahaismo (religio): バハイ教。

(*15) Rabindranat Tagor: hinda literaturisto

(*16) Tokia Universitato (en Tokio): 東京大学。

(daŭrigota)



Insigno por “Projekto Eroŝenko 125-jara”
(Legu la oktobran numeron.)